



ENHAVO

ENKAĜIGITAJ	3, 4
EL NIA SEKRETARIEJO	4
KORESPONDOPETOJ	4
III-A HEJS-TENDARO	5, 6
INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO	6
PRI NIA REVUO	7, 8
UNIVERSALA DEKLARACIO DE RAJTOJ DE LA POPOLOJ	9, 10, 11, 12
ĈU EKZISTAS "NEDERLANDA" LINGVO ?	13
MI NUN RAKONTOS AL VI MALGAJAN RAKONTON	14, 15
DON KIĤOTO, SURVOJE	16
LA SERĈADO	16
LA VIRINO EN LA HISPANA SOCIETO	17
ESPERANTO INTER FILATELISTOJ	18
DIS-TRO	19
NI REKOMENDAS	20

HEJS - Marto-Aprilo 1977 - N-ro 105 (2) - 19a Jaro
 INTERNA BULTENO ORGANO DE HEJS (HISPANA ESPERANTO-JUNULARA SEKCIO)
 Gral. Mola, 99, 1r - Apartat 407 - SABADELL (Barcelona) - Hispanio
 Konto n-ro 15049-56 en Banc de Sabadell (ĉefa oficejo)
 Konto n-ro 830916 en Caja Postal de Ahorros
 Prezidanto: Ludoviko de Yzaguirre Ĉefredaktoro: Oscar Puig
 PRI LA SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ, RESPONDECAS NUR LA AŬTORO, KAJ PRI
 OFICIALAJ KOMUNIKOJ, ĈEFARTIKOLOJ, K.A., RESPONDECAS TUTA ESTRARO
 KAJ REDAKCIO.

Presas: "Copisteria Reñé" - Dip. Legal: B.6519-1977 - ©HEJS 1977

ENKAĜIGITAJ

Ne, ne temas pri zoologia ĝardeno, estas ni kiuj estas enkaĝigitaj, kaj malgraŭ tio ke la kaĝo estu ora, ..., imagu nur ke ni eldonis jam du bultenojn kaj ĝis nun ni ankoraŭ ne scias ĉu la estraro estos aprobata aŭ ne de la Federacio, ridinda ĉu?, do, nur estas la komenco.

Ni, prenante HEJS, ne riĉiĝis pri honoroj aŭ kategorio, nur pri laboro, kaj nia celo estas labori nur pro Esperanto, kial do ni havas malfacilaĵojn por agi tiucele? Por ke vi plene sciu la kondiĉojn sub kiuj ni devas labori, ni mencias nur kelkajn:

- La prezidanto estas elektata de HEF, la eks-HEJS-estraro nur povas proponi, imagu se ekzemple oni okazigos baloton inter la membraro kaj ĝi akceptus kiel prezidanton personon ne plaĉa al HEF, li ne rajtus havi tiun postenon, kaj estus fingre elektita de la Federacio alian personon.
- Ni povas fari nenion sen antaŭe peti permeson al HEF, t.e., la Federacio rajtas akcepti aŭ ne la okazigon de estrarkunveno, renkontiĝo, seminario, la eldonon de flugfolio, de bulteno, de informilo, la ŝanĝon de nia interna regularo, k.t.p. Sed plej grave estas ke ni devas antaŭvidi ĉion kun sufiĉa tempo por ke letero petante permeson alvenu kaj revenu el Madrid, kaj ĉiu scias ke la skribemo ne estas la ĉefa virto de la HEF-estraranoj ..., tio kunportas ke ni povas anonci nenion sen havi permeson, kio terure malfaciligas nian laboron.
- HEJS estas ekonomie sendependa, kaj ege dependa el la Federacio, aliamanlere dirite, HEF nur malhelpas nian laboron, tute ne helpas ĝin.

Tiu situacio estas tiel ridinda, kiel homo havanta propran domon, laboranta, eĉ kun propra familio, sed por ion fari, aĉeti, ekskursi, vojaĝi, ŝanĝi de laborejo, k.t.p., li devas peti permeson al sia patro, kiu vivas alie kaj tute ne konas la kondiĉojn de la vivo de sia filo.

Kion ni celas per tiuj kritikoj ne estas riproĉi la Federacion, ĉar ni scias ke ĝi agas nur por la bono de Esperanto kaj deziras malhelpi nenion, tiujn ĉi menciitajn problemojn ni rakontas kaj por ke ili komprenu kaj konstatu la malfacilaĵojn senintence donitaj al ni, kaj por ke ili plej rapide solvu ilin.

Por la plej bona funkciado de HEJS ni proponas ŝanĝi la nunan regularon, kreante novan kiun celu al plej libera kaj efika laboro por Esperanto sen tiom da burokrataj paŝoj kiuj utilas al neniu kaj konstante kapdolorigas nin.

Ekzemple en TEJO okazas io simila, ĝi estas la junulara sekcio de UEA sed, la rilatoj inter la du organizaĵoj estas tute malsamaj al la rilatoj inter HEJS kaj HEF.

1e- TEJO signifas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, konstatu ke en la nomo ne aperas la vorto *sekcio*, kiel en HEJS, kio signifas Hispana Esperanto-Junulara Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, nomo terure longa krom kakofonia kaj ĝia mallongigo (HEJS de HEF) malbonprononcebla. Preskaŭ neniu junulara sekcio de la landaj Esperanto-Federacioj havas en sia nomo la vorton *sekcio*.

2e- TEJO estas age sendependa kaj ekonomie dependa, tio donas grandan avantaĝon, ĉar ĝi povas plene dediĉi al la Esperanto-laboro sen priokupiĝi pri la mono, dum ni ĉiam devas unue pensi kiel agi por gajni monon.

Ni nur dezirus, do, ricevi de HEF samajn rilatojn, kiel TEJO ricevas de UEA. Certe, ĉiuj membroj akordiĝos kun ni pri tio, kaj al ni plaĉus ricevi proponojn tiusence.

LA ESTRARO



EL NIA SEKRETARIEJO, EL NIA SEKRETARIEJO, EL NIA SEKRETARIEJO, EL NIA

- GRAVA NOTO NI SCIIGAS AL ĈIU MEMBRO ANKORAŬ NE PAGINTA LA ĈI-JARAN KOTIZON (200,- PTOJN), KE NIA VENONTA NUMERO ESTOS SENDATA KONTRAŬPAGE, TIO SIGNIFOS GRANDA TASKO POR NI, PRO TIO BONVOLU SENDI TUJ VIAN KOTIZON PERE DE POŝTĜIRO AL NIA SIDEJO, DE ĜIRO AL NIA KURANTA KONTO EN BANC DE SABADELL, AŬ PAGANTE EN LA POŝTA OFICEJO DE VIA URBO AL NIA KONTO EN CAJA POSTAL DE AHORROS, SENDANTE ĈEKOJN, ALDONU DEK PROCENTON AL LA KOTIZO POR PAGI LA BANKKOSTOJN (KONTONUMEROJ KAJ ADRESOJ EN PAĜO 2).
- NI DANKAS LA MONDONACOJN DE S-ANOJ RAMÓN MOLERA EL MOYÀ KAJ MANUELO LÓPEZ HERNÁNDEZ EL ALICANTE POR NIA SEKCIO, VERE UTILAJ KAJ DANKINDAJ EN LA NUNAJ MALFAVORAJ CIRKONSTANCOJ.
- NI RICEVIS PLURAJN LETEROJN EL MEMBROJ KURAĜIGANTE KAJ GRATULANTE NIN PRO NIA LABORO, SPECIALE MENCIINDA ESTAS TIU DE S-ANO SIMO MILOJEVIĆ REDAKTORO DE "ESPERANTO", KORAJN DANKOJN!
- NI RICEVIS KELKAJN ALIĜILOJN (KUNSENDITAJ KUN LA 104A NUMERO DE HEJS) SED MULTAJ ANKORAŬ MANKAS, BONVOLU PLEJ RAPIDE SENDI ILIN AL NI, ĈAR ĜIA GRAVECO ESTAS GRANDA, NE FORGESU SKRIBI LA NASKIGDATON.

Korespondopetoj

- Ĝoje al kono de nia lando, deziras korespondi f-ino Geraldina Gatecka, kies adreso estas: 53-230 Wrocław, ul. Inżynierska 70/46 - POLLANDO.
- Ankaŭ deziras korespondi tiun poŝtan junulon: Jerzy Michalski, ul. Pocztowa 2 26-660 Jedlińsk - POLLANDO.
- Kara samideano! Se vi, via samurbano aŭ samlandano volas korespondi kun poltavaĵ geesperantistoj, skribu al ni. La adreso de nia klubo estas jena: UKRANIO, SIJ-314000, Poltava, Gogol-strato 10, Dvorz profsojuzov, Esperanto-klubo, al prezidanto de E-klubo Vasilij Grigorenko.
- Al supra menciita adreso, ankaŭ vi povas sendi salutleterojn okaze de la ĵus komencitaj kursoj de Esperanto.

III.a HEJS- TENDARO

Se vi
deziras
amuziĝi
en
amikeca
kaj
junulara
etoso,
nepre
partoprenu
la de nun
internacian
IIIan
HEJS-
Tendaron.



Ni
konsilas
ke vi
kunportu
muzikilojn,
sed
krome
ne forgesu
kunporti
varmigilojn,
kiu
avertas
ne
estas
perfidulo!

Sed rememoru ke malgraŭ la frostoj, la pluvo aŭ la neĝo, nia devo kiel HEJS-anoj estas partopreni la tendaron. Ne timu, se vi pluvis post la I-a kaj la II-a tendaro, certe vi ankaŭ pluvis post tiu.

MADRID

7,8,9,10/Aprilo

PROGRAMO

ALIĜKOTIZO

HEJS-anoj: 250,- ptoj.
ne-HEJS-anoj: 300,- ptoj.

POR IRI AL LA TENDAREJO

Se vi venas aŭtomobile, serĉu
la ŝoseon MADRIDO-BARCELONO
kaj deflankiĝu direkte BARAJAS
PUEBLO.

Se vi alvenas trajne:

- 1e- Iru per metro ĝis
CIUDAD LINEAL
- 2e- Prenu aŭtobuson P-5 aŭ M-5
(CIUDAD LINEAL - BARAJAS
PUEBLO) kaj diru al la ŝoforo
ke li haltiĝu en la
CAMPING OSUNA.

internacia junulara festivalo

Dum Pasko ĉi-jara okazos en Le-
viko (Italio) la Internacia Ju-
nulara Festivalo organizita de
la Itala Esperantista Junularo
(IEJ). Tiu grava evento havos
5-taga programo sub la temo "Es-
peranto-instruado kontraŭ la so-
cia diskriminacio".

La Festivalon komencos la 7-a
de aprilo posttagmeze kaj finos
la 11-a ankaŭ posttagmeze.
Aliĝu, kun kroma antaŭpago de
10.000 italaj liroj al la poŝt-
ĉekkonto 22/21368 B. Casini-Pi-
sa-Italio, al IEJ - Itala Espe-
rantista Junularo, Poŝtfako 210
I-56100 PISA (Italio).

ĴAŬDO 7

ESTU BONVENINTAJ!

Akceptado
Kiel vi fartas?
Interkona muzikado kaj "balai-
la" dancado

TRINKU, TRINKU LA FLAMANTAN ALKO-
HOLAĴON!

"Queimada"

ĈU VI ESTAS, EBLE, LA PLEJ MALBE-
LA VIRO EN LA TENDARO?

Elektu de la "malbelegulo"

VENDREDO 8

NUN EKSERIOZIĜU, MI PETASI!

Ĝenerala informo kunsido pri
HEJS

KIO ESTAS ESPERANTO?

Forumo por la neesperantistaj
tendaranoj

KANTU NI ĈIUJ!

Kantado kaj lernado de espe-
rantaj kantoj

KIOM VI SCIAS PRI LA ESPERANTO-
MOVADO?

Esperantodemanda konkurso

SILENTU, KANTAS "JOHANO"

Kantado de ĉi tiu nova kantis-
to kaj esperantisto kiu gajnis
la lastan "Festival de Valla-
dolid"

SABATO 9

ĈU VI ŜATUS KONI TOLEDO KAJ
ARANJUEZ?

Plentaga ekskurso

JES, VI POVAS ESTI ĈARLO, ARABULO,
FRANKENSTEIN, RUĜHAŬTULO, BALAILA
SORĈISTINO, KOŬ BOJ, AŬ TRAVESTU-
LO ...

Ĉifona balo

DIMANĈO 10

NI ĈIUJ MANĜU BONE!

Komuna manĝado

ĜIS LA!

Adiaŭ

PRI NIA REVUO

Nia revuo ekde la antaŭa numero komencis novan etapon de sia vivo. Ĝi transformiĝis kaj pri la formo kaj pri la enhavo, kompreneble, por ĉiufoje plialtigi ĝian kvaliton.

Ĉar ni jam diris ke tiu-ĉi revuo apartenas al ĉiu, estas nia devo raporti iomete por vi pri ĝia nova aspekto kaj enhavo, do, jen ĝi:

Kovrilpaĝo: Ĝi estos ĉiunumere malsamkolora, tio donas allogan aspekton kaj plia diverseco, La unua estis ruĝa, tiu-ĉi blua, kaj la venonta alikolora. En la kovrilpaĝo ĉiam aperos kio estas plej interesa je la apero de la revuo, kaj interne vi trovos ampleksigitan tiun temon.

Sekcioj: Jam interne de la hulteno troviĝas pluraj artikoloj, kaj vi konstato ke oni povas disdividi ilin inter kelkaj sekcioj (Ĉefartikolo, Tradukaĵoj, "El la Arkivo", Lingva Problemo, Esperanta Movado, Filologiaj aferoj, "Dis-tro", "Ni Rekomendas", Kontribuoj, kaj eble aliaj). Tiuj sekcioj ne devige aperos en ĉiu numero, sed ili formas la skeleton de la revuo. Nun ni parolos detale pri tiuj sekcioj.

Ĉefartikolo: Kiel en ĉiu revuo de la mondo, ĝi temas pri io vere grava kaj interesa, ĝi reprezentas la opinionon de la estraro kaj redakcio, pro tio, ni varme rekomendas al ĉiu ĝian atentan legadon.

Tradukaĵoj: La tradukaĵoj el naciaj lingvoj ŝajnas negravaj, sed estas tute kontraŭe, ĉar la tradukaĵoj estas la plej rapida kaj efika maniero diskonigi inter la alinacianoj kulturon, kaj se temas pri esperantaj tradukoj, la efiko multobliĝas, ĉar krom diskonigi kulturojn, la esperanta literaturo riĉiĝas el la plej gravaj naciaj literaturaĵoj, tio evidentiĝis en la Internaciaj Floraj Ludoj. Ni do, laŭeble daŭre publikigos en nia revuo tradukaĵojn el naciaj lingvoj; en la unua numero aperis katalunan verkon, en tiu-ĉi galegan, kaj ni dezirus ricevi tradukojn el la eŭskera, el la kastilia, k.t.p.

"El la Arkivo": Tiu sekcio ne celas plenigi la revuon per eltiraĵoj el antikva gazeto. Ne, ĝia celo estas sciigi vin ĉiuj pri interesaj artikoloj, poeziaĵoj, kaj aliaj literaturaĵoj, kiuj aperis antaŭ kelkaj jaroj kaj nun estas forgesitaj, kaj ĝia intereso estas hodiaŭ speciale grava aŭ simple kurioza.

Cerpante laŭlonge el la historio oni trovas verajn trezorojn kiuj ni eĉ ne imagis, multfoje ni servas argumentojn por propagandi Esperanton kaj ni ne scias ke en flaviĝintaj paperoj duonmangitaj far tineoj troviĝas la longserĉataj konvinkigaj frazoj kiujn ni bezonas.

Lingva Problemo: Ĝenerale, la neesperantistoj tute ne scias pri la monda lingvo-problemo, aŭ almenaŭ taksas ĝin malgrava. Sed plej bedaŭrinde estas ke multaj esperantistoj ankaŭ troviĝas en sama situacio. Tiu sekcio konstante donos al vi detalojn, ciferojn kaj raportojn pri la lingva problemo, unu el la plej akraj el nia nuntempa mondo.

Esperanto-Movado: En tiu sekcio estos loko por anonci kaj komenti ĉiun kongreson, renkontiĝon, tendaron, seminarion, k,t,p, koncernantan la Esperanto-Movado. La longeco de tiuj raportoĵoj dependos ne nur de la graveco de la okazontaĵo, sed ankaŭ de la intereso kiun povas vekti al la leganto, tiu evento.

Filologiaj aferoj: Ĉio pri la internacia lingvo laŭ filologia vidpunkto povas tie aperi, vi jam komprenas la gravecon de tia sekcio, ĉar lingvo devas evolui por pluvivi, kaj en niaj paĝoj estos ĉiam spaco por kunlabori tiusence. Ni povas aperigi tie studojn pri tiklaj temoj kiel ekzemple "Hispanio aŭ Hispanujo", "far" aŭ pri prononcdifektoj de la kastililingvanoj, aŭ pri alia faco de tiu larĝa studobjekto.

"Dis-tro": Tiu-ĉi kunmetaĵo signifas nenion, sed ĝia distreco ja sufiĉas, ĉar tiu paĝo havas tiun celon: distri, ĉar ni konscias ke ne nur ni devas vivi el seriozaĵoj, ankaŭ ni rajtas je distro, krom je multaj aliaj aferoj kiuj estas malrespektataj, kaj plie, ĉar ĉiu distro kunportas lernadon, tralegante kaj solvante la problemojn de tiu paĝo vi lernos Esperanton kaj riĉiĝos via vorthavaĵo.

"Ni Rekomendas": Sub tiu titolo, ni post studi la esperantlingvajn kulturilojn ekzistantajn, rekomendas tiujn plej interesajn por vi ĉiuj. Ankaŭ ni povas rekomendi neesperantlingvajn kulturilojn kiujn ni konsideras sufiĉe gravajn kaj legindajn, vidindajn aŭ skultindajn de vi. Kompreneble ĉio de ni rekomendita estas studita el esperantista vidpunkto, pro tio ni rekomendas ĉion kio havas saman celon kiel la nian.


Kontribuoj: Tio vere ne estas sekcio, ĉar la alvenintaj kontribuoj povas aparteni al la jam menciitaj sekcioj, sed ni konsideris la kontribuojn kiel sekcion, ĉar kelkajn skribaĵojn ni ne povas inkluzivi en la jam supre cititaj sekcioj.

Kaj tio estas ĉio pri nia revuo, nur restas alvoko al ĉiu leganto, por ke vi sendu viajn kreaĵojn al ni kaj tiel la revuo estos vere de ĉiu kaj de ĉiuj.

Kontribuoj: Tio vere ne estas sekcio, ĉar la alvenintaj kontribuoj povas aparteni al la jam menciitaj sekcioj, sed ni konsideris la kontribuojn kiel sekcion, ĉar kelkajn skribaĵojn ni ne povas inkluzivi en la jam supre diritaj sekcioj.

Kaj tio estas ĉio pri nia revuo, nur restas alvoko al ĉiu leganto, por ke vi sendu viajn kreaĵojn al ni kaj tiel la revuo estos vere de ĉiu kaj de ĉiuj.

LA REDAKCIO



La Ligo por la Rajtoj kaj la Liberigo de la popoloj estas internacia organizao -kun diversaj branĉoj en nia ŝtato- rezultanta el iniciato de Tribunalo "RUSSELL", kies ĝenerala celo estas prezentita de ĝia nomo mem. Pli konkreta mejlo-ŝtono estas la diskonigo kaj akceptigo (ĉe UNO kaj ĉiuj aliaj gravaj interŝtataj organizaĵoj) de Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Popoloj, kiun ni prezentas al nia tuta legantaro. Ĝi ankoraŭ estas nur projekto, ĉar neniu ŝtata aŭ interŝtata instanco subskribis ĝin, sed fakte oni konsentas, ke ĝia akcepto donos al la homaro alian pacan batalilon por pli justa socio. Speciale grave por ni esperantistoj estas la IVa Sekcio (Rajto al kulturo, kiu kontraŭstaras la altrudon de fremdaj lingvoj kaj kulturoj), ĉar ĝi malrekte pravigas nin pri tio, ke ĉiu kulturo kaj ties lingvo devas esti respektata kaj ke, por inter-naciaj aŭ inter-ŝtataj rilatoj estu uzata nenies/ĉies lingvo.

UNIVERSALA DEKLARACIO DE RAJTOJ DE LA POPOLOJ

ANTAŬPAROLO

Ni vivadas tempon de grandaj esperoj sed ankaŭ de grandaj maltrankvilecoj,

tempon plena de konfliktoj kaj kontraŭdiroj,
tempon en kiu la liberigaj luktoj starigis la mondajn popolojn kontraŭ la naciaj kaj internaciaj strukturoj de la imperiismo kaj sukcesis frakasi la koloniismajn sistemojn,

tempon de luktadoj kaj venkoj, en kiu la nacioj celas novajn idealojn de justeco,

tempon en kiu la rezolucioj de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj, ekde la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĝis la Kartodo de Ekonomiaj Rajtoj kaj Devoj de la Ŝtatoj, esprimas la serĉadon de nova politika kaj ekonomia ordo internacia.

Sed ankaŭ estas tempo de malsukcesigoj kaj fiaskoj dum kiu aperas novaj formoj de imperiismo por subpremi kaj ekspluati la popolojn.

La imperiismo per siaj abomenindaj kaj brutalaj procedoj kaj kun la kunlaborado de registaroj ofte instalitaj de ĝi mem, daŭre superregas parton de la mondo: Per la interveno rekta aŭ nereakta; per la plurnaciaj entreprenoj; uzante koruptitajn lokajn politikistojn; helpante militistajn reĝimojn fonditaj sur polica subpremado, turmentado kaj fizika ekstermo de tiuj, kiuj ilin kontraŭstaras; per la praktikaro, kiun oni nomas nov-koloniismo, la imperiismo disvastigas sian superregon super multnombraj popoloj.

Konsciaj pri tio, ke ni interpretas la aspirojn de nia epoko, ni kunvenis en Alĝero por proklami, ke ĉiuj popoloj de la mondo same rajtas la liberecon, liberiĝi de ĉia fremda intermiksiĝo kaj doni al si la regosistemon, kiun ili volos elekti; ili rajtas -se ili estas sklavigitaj- lukti por sia liberiĝo kaj ricevi en sia luktado la helpon de aliaj popoloj.

Konvinkitaj pri tio, ke la efektiva respekto al la homaj rajtoj implikas la respekton al la rajtoj de la popoloj, ni estas adoptintaj la UNIVERSALAN DEKLARACION DE RAJTOJ DE LA POPOLOJ.

Ĉiuj, kiuj tralonge kaj larĝe en la mondo realigas la egan bataladon por la libereco de ĉiuj popoloj, kelkafoje kun armiloj ĉemane, trovu en tiu ĉi deklaro asertilon pri la legitimeco de sia luktado.

SEKCIO I RAJTO AL EKZISTO

- Artikolo 1.- Ĉiuj popoloj havas la rajton ekzisti.
- Artikolo 2.- Ĉiuj popoloj rajtas al sia nacia kaj kultura identeco.
- Artikolo 3.- Ĉiuj popoloj havas la rajton konservi pacan posedon de sia teritorio, kaj reveni al ĝi, en okazo de elpuŝo.
- Artikolo 4.- Neniu, pro sia nacia aŭ kultura identeco, povas esti amasbuĉita, torturata, persekutata, elportata, elpuŝata, nek submetata sub vivkondiĉoj, kiuj kompromitas la identecon de sia popolo.

SEKCIO II RAJTO AL POLITIKA AŬTONOMECO

- Artikolo 5.- Ĉiuj popoloj havas nepran kaj nealiigeblan rajton al aŭtonomigo. Ili devas libere decidi sian politikan staton sen iu ajn fremda entrudiĝo.
- Artikolo 6.- Ĉiuj popoloj rajtas liberiĝi el ĉia kolonia aŭ eksterlanda regado, rekta aŭ malrekta, kaj el ĉiuj racismaj reĝimoj.
- Artikolo 7.- Ĉiuj popoloj havas rajton al demokrata reĝimo reprezentanta la tutan aron da civitanoj sen distingo pri raso, sekso, kredoj aŭ haŭtkoloro, kaj kapabla por defendi efektive la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn por ĉiuj.

SEKCIO III EKONOMIAJ RAJTOJ DE LA POPOLOJ

- Artikolo 8.- Ĉiuj popoloj havas ekskluzivan rajton al siaj havaĵoj kaj naturaj riĉecfontoj. Ili havas rajton rekuperi ilin en okazo de firabo kaj same havas rajton por ricevi la mono-kompensojn maljuste pagitajn.
- Artikolo 9.- La scienca kaj teknika progreso, apartenas al la komunaj havaĵoj de la homaro, pro tio, ĉiuj popoloj havas la rajton partopreni ĝin.
- Artikolo 10.- Ĉiuj popoloj havas rajton esti juste pagitaj por sia laboro, kaj, ke la internaciaj intersanĝoj fariĝu laŭ justaj kaj senpartiaj kondiĉoj.
- Artikolo 11.- Ĉiuj popoloj havas la rajton elekti tiun ekonomian kaj socian sistemon, kiun ili volas, kaj sekvi sian propran vojon al la ekonomia disvolvo libere kaj sen fremdaj entrudiĝoj.
- Artikolo 12.- Ĉiuj ekonomiaj rajtoj ĵus cititaj, devas efektiviĝi laŭ spirito de solidareco inter ĉiuj popoloj de la Tero kaj laŭ iliaj koncernaj interesoj.

SEKCIO IV RAJTO AL KULTURO

- Artikolo 13.- Ĉiuj popoloj havas la rajton paroli sian propran lingvon, protekti kaj disvolvi sian propran kulturon, helpante tiel la riĉigon de la tuthomara kulturo.
- Artikolo 14.- Ĉiuj popoloj havas la rajton al siaj artaj, historiaj kaj kulturaj havaĵoj.
- Artikolo 15.- Ĉiuj popoloj havas la rajton malebligi, ke oni trudu al ili fremdan kulturon.

SEKCIO V RAJTO AL EKSTERA SPACO KAJ AL KOMUNAJ HAVAĴOJ

- Artikolo 16.- Ĉiuj popoloj rajtas konservi, protekti kaj plibonigi sian medion.
- Artikolo 17.- Ĉiuj popoloj rajtas utiligi la posedaĵojn komunajn al la homaro, kiel la altan maron, la mar-fundojn, la ekster-atmosferan spacon.
- Artikolo 18.- En la efektiviĝo de la ĵus-diritaj rajtoj, ĉiuj popoloj devas konsideri la bezonon akordigi la postulojn de illa ekonomia disvolvo kun tiuj de la solidareco inter ĉiuj popoloj de la mondo.


SEKCIO VI RAJTOJ DE LA MALPLIMULTOJ

- Artikolo 19.- Kiam popolo estas malplimulto en iu ŝtato, ĝi havas la rajton, ke oni respektu ĝiajn identecon, tradiciojn, lingvon kaj kulturan havaĵon.
- Artikolo 20.- La minoritatoj devas ĝui sendiskriminacie la samajn rajtojn kiel la aliaj ŝtatoj kaj partopreni kiel tiuj-ĉi la publikan vivon.
- Artikolo 21.- La efektiviĝo de tiuj-ĉi rajtoj devas respekti la legitimajn interesojn de la tuta komunumo, kaj oni ne permesos endanĝerigon al la teritoria integreco kaj politika unueco de la ŝtato, kiam ĝi agas laŭ ĉiuj principoj formulitaj per tiu ĉi deklaro.

SEKCIO VII GARANTIOJ KAJ PUNOJ

- Artikolo 22.- Ĉia neefektiviĝo de la dispozicioj de ĉi-deklaro konstituas transpaŝo de la devoj al la tuta internacia komunumo.
- Artikolo 23.- Ĉia malbonaĵo rezultanta de neefektiviĝo de ĉi-deklaro estu plene riparita far tiu, kiu ĝin kaŭzis.
- Artikolo 24.- Ĉia riĉiĝo atingita je malprofito de popolo per la transpaŝo de la dispozicioj de ĉi-deklaro devigas al redono de la profito tiel atingita. Egale okazu pri la troa profito akirita per la fremdvenaj investoj.
- Artikolo 25.- Ĉiuj traktatoj, interkonsentoj aŭ kontraktoj, malegalaj eksmodiĝintaj, bazitaj sur la malŝato de la fundamentaj rajtoj de la popoloj, ne validas.
- Artikolo 26.- La fremdaj financaj ŝarĝoj, kiuj fariĝis troegaj aŭ neelteneblaj por la popoloj, ne povas plu esti valide postulataj.

- Artikolo 27.-** La gravaj atencoj al la fundamentaj rajtoj de la popoloj, ĉefe al la rajto al ekzisto, estas internaciaj krimoj, kiuj kunportas individuan leĝpunan respondecon al la kulpintoj.
- Artikolo 28.-** Ĉiuj popoloj, kies fundamentaj rajtoj estas damaĝitaj, havas la devon agnoskiĝi ilin precipe per politika kaj sindikata luktado kaj eĉ, kiel lasta rimedo, per la forto.
- Artikolo 29.-** La liberigaj movadoj devas esti akceptitaj ĉe la internaciaj organizaĵoj kaj iliaj batalantoj rajtas la protekton de la humana primilita juro.
- Artikolo 30.-** La restarigo de la fundamentaj rajtoj de popolo, kiam tiuj-ĉi rajtoj estas grave malobservataj, estas devo, kiu trudiĝas al ĉiuj anoj de la internacia komunumo.



ĈU EKZISTAS "NEDERLANDA" LINGVO?

La plua ekzistado de la terminoj flandra kaj hollanda malfaciligas, ke en multaj lokoj en la mondo la homoj sciu, ke la standardlingvo en la nordo de Belgio (Flandrujo) kaj en Nederlando estas la sama kaj nomiĝas "nederlanda". Ofte ni ankaŭ aŭdas, ke, precipe Flandroj, sed ankaŭ Nederlandanoj, parolas pri ABN (Algemeen Beschaafd Nederlands) por designi la "ĝeneralan civilizitan nederlandan". La uzado de tiu siglo rezultas parte el la tabuo, kiu antaŭ 30-40-50 kuŝis sur la termino "nederlanda" en Belgio, kiam la franca estis la sola deviga kulturlingvo por ĉiuj Belgoj. La nederlanda lingvo estis konsiderata kiel la lingvo de "Hollando", kontraŭ kiu la belga ŝtato kondukis sin hostile tiutempe. Por neniun malkontentigi oni tial devis diri ABN, tiom multe, ke tiuj tri leteroj eĉ estis repuŝontaj la veran nomon de nia lingvo. Tial oni antaŭ nelonge oficiale interkonsentis en la Kulturkonsilio ke la sola korekta uzota termino estu "nederlanda" (en la kastilia: nederlandés, en la franca: néerlandais kaj en la angla: Dutch).


Tamen, estas ankaŭ vere, ke multaj homoj en Belgio kaj Nederlando ankoraŭ daŭre uzas la vorton "flandra" aŭ "hollanda" anstataŭ la novan nomon "nederlanda", sed tio ne estas konforma al la lasta evoluo. Same kiel nuntempe "nederlanda" fariĝis la ĝenerala nomo por indiki, ke ekzistas nur unu komuna standardlingvo, kaj en Nederlando kaj en Flandrujo, tiel ankaŭ la "franca" kaj ne la "valona" estas la oficiala kulturlingvo en la sudo de Belgio (Valonujo). La unueco de la nederlanda lingvoregiono estas klare pruvita en komunaj vortaroj, lernejojlibroj, literaturo kaj interŝanĝo de televidorpogramoj. Revuoj kaj ĵurnaloj, ĉiuj uzas la saman lingvon. Estas hodiaŭ proksimume 20 milionoj da nederlandlingvanoj. Tio estas pli ol ĉiuj danaj, norvegaj kaj svedaj parolantoj kune; tio signifas, ke la nederlanda estas mezgranda eŭropa lingvo. Tamen pro la multeco de terminoj kiuj ekzistas por ĝi, la nederlanda lingvoregiono ŝajnas ofte al eksterlandanoj pli malgranda.

Per tiu artikolo mi volas instigi vin, finiĝi la erarajn konceptojn, kiuj ankaŭ en via lando pluvivas rilate nian lingvon. Estus des pli bone, se vi estonte ankaŭ reagas persone kontraŭ tiun misprezenton en hispanaj revuoj ktp., aŭ dum paroladoj kun geamikoj.

En Belgio kaj Nederlando aŭ eĉ en TEJO ankaŭ regas samspecaj eraroj rilate la kastilian. Kiu skribos artikolon ĉi-rilate por nia nova nederlandlingva E-ĵunularrevuo "JEN...!"?

Por tiuj, kiuj volas interkonatiĝi kun Belgio mi ankoraŭ volas rekomendi la belaspektan, kolorriĉan broŝuron, kiu titolas: "Bélgica, naturaleza, arte y gastronomía" kaj kiu donas bonegan superrigardon super ĉiuj aspektoj de la lando. Ĝi estas senpage havebla ĉe: CGTB, Calle Navas de Tolosa nº 3, Piso 2º, MADRID 13 - Tlf.: 2212681.

MI NUN RAKONTOS AL VI MALGAJAN RAKONTON



La homo kiu scias multajn leĝojn povas fari multajn artifikaĵojn.



-Kiel fartas la infanoj?
-Mi havas unu tiel saĝa ke li havas dek kvin jaroj kaj jam ne kredas je Dio.

MI NUN RAKONTOS AL VI MALGAJAN RAKONTON. Ete post la edziĝo, Sinjorino Mikaela komencis kudri ĉemizetojn. Sed ŝia revo cindriĝis subite kaj kun larmoj en la okuloj ŝi metis en botelon enhavantan brandon la perditan frukton de sia amo.

Sinjorino Mikaela skribis en papereto "Adolfo, 12a de Majo 1887", ŝi gluis la papereton en la botelo kaj, poste ol ŝi kisis ĝin malgaje, gardis ĝin en la ŝranko por la littukaĵoj el lino.

Ne ridu, ĉar la rakonto estas malgaja.

Ancoraŭ ne forpasis kvar monatoj, kiam Sinjorino Mikaela reprenis denove la kudradon ĉe la ĉemizetoj. La bona sinjorino regalis sin cerbumante pri heredonto, kiu jam ekpaŝis la vojon al la mondo, kaj duafoje Sinjorino Mikaela vidis forvelkitaj siajn patrinecajn revojn kaj kun ĝisosta malĝojeco ŝi metis en brandon la novan frukton de sia amo..

Sinjorino Mikaela skribis: "Rosa, 7a de Januaro de 1888". Ŝi gluis la papereton en la botelo kaj tre amare gardis ĝin en la ŝranko por la littukaĵoj el lino.

Ne ridu, ĉar la rakonto estas malgaja.

La kompatinda sinjorino ploris ankoraŭ tri fojojn kaj metis en ĉi-tiom da brandoboteloj "Petron", "Ramonon", kaj "Alican".

Ne ridu.

La bona sinjorino konvinkigis, ke ŝi neniam naskos veran filon kaj, per siaj grandaj patrinaj deziroj, dediĉis la tutan vivon al la karesa vartado de la brandoboteloj. Malfeliĉa vivado!

Ne; ne ridu, ĉar la okazo estas malgaja.

Kiam unu el la fiaskitaj revoj atingis dat-revenon, Sinjorino Mikaela renovigis la brandon. Ĉiutage ŝi kisis la botelojn kaj reordigis la silkajn bantojn, ĉirkaŭligantajn la kolojn de la boteloj de "Rosa" kaj "Alica".

La bona sinjorino maljuniĝis kaj havis tiom fidindajn servistinojn, ke ili posedis ĉiujn ŝlosilojn kaj mastrumis la domon.

Iam venis antaŭ Sinjorino Mikaela unu el la servistinoj. Ŝi venis tiel komfuzita, ke ŝi ne povis paroli. Sed la kompantinda virino fetis sin teren kaj iom-post-iome konfesis inter plorĝemoj:

Pardonu, mia mastrino! Aj, kia malfeliĉo, sinjorino! Sinjorido "Adolfo" falis el miaj manoj kaj rompiĝis.

Kaj ĉi-tiam, Sinjorino Mikaela svenis por ĉiam.

KASTELAO el COUSAS

Tradukita el la galega far L. Sobré.

Kastelao (Alfonso Rodríguez Castelao) naskiĝis en Rjanso la jaron 1886an kaj mortis en Buenos-Ajreso, Argentino, la 1950an.


Li estas unu el la plej grandaj filoj el Galegujo, kaj lia genio situas lin inter la grandulojn de la homaro. Politikiisto, verkisto, desegnisto kaj, super ĉio, homo.



-Se trafus min loto, mi aĉetus panon.



-Oni min maltraktas, persekutas, insultas, kaj ĉio ĉar mi estas potenculo.



En la lasta kunsido de la Patronaro de "Fondaĵo Esperanto" okazinta la 27an de januaro 1977, oni speciale studis la proponon de la Hispana Esperanto-Junulara Sekcio (HEJS) eldoni la verkon "Don Kiĥoto de la Manĉo" en la Esperanta traduko de Fernando de Diego kaj malfermi konton, (kiun HEJS mem komencis per donaco de 2.000 pesetoj) por kolekti fonduson por helpo de la eldonkostoj.

La Patronaro unuanime akceptis la sugestojn de HEJS kaj laŭ propono de D-ro Sancho Izquierdo, la "Fondaĵo Esperanto" malfermas la diritan konton per la mono destinita por siaj ĉijaraj literaturaj konkursoj.

"Don Kiĥoto de la Manĉo", kiu estas jam kompostata, aperos proksimume en junio ĉijare en formato 17,5 x 22, ilustrita, "Milskin"-bindita kun 67 paĝoj kaj ĝia proksimuma prezo estos 1.500,- pesetoj por ĉiu ekzemplero. Por antaŭendoj, kun samtempa antaŭpago, ricevitaĵ ĝis la 30a de majo, la dirita prezo reduktiĝas al 1.000 pesetoj.

Mendoj kun pagoj, -kaj donacoj- oni sendu al Inés Gastón, Pº Marina Moreno, 35, 4º, dcha. ZARAGOZO-1, His-

panio.

NOTO: Ĝis nun oni donacis 29.000,- pesetojn.

LA SERĈADO

Adolfo Gannet, fama angla kuracisto de la pasinta jarcento, ricevis mirindan revelacion en sia kliniko de Londono: malsanulo komunikis al li ke li sciigis, en blua sonĝo, ke la morto estas nur senfina galerio de portretoj.

-Tiu, kiu inter la milionoj da malaperintaj vizaĝoj trovas la sian -aldonis la konfidanto-, povos reenkarigi.

Gannet mortis en 1895, en Skotlando. En lia lasta kuŝejo, lia mieno ridetis kun la dolĉa mistero de tiu, kiu esperas entrepreni tre agrablan serĉadon.

Aŭtoro: Oscar Acosta
Elkastiliigo de: Liven dek

Ĉi eta rakonto estas eltirita el hispanamerikana antologio de scienca fikcio, kie ĝi troviĝas kiel unu el la reprezentantoj de Hon. duraso.

LA VIRINO EN LA HISPANA SOCIETO

Devige oni devas diri, ke ŝia situacio en Hispanio pliboniĝis eksterordinare, ekde kiam oni solenis la internacian virinan jaron en 1975.

Kvankam la socialaj plibonigoj atingitaj estas tre estimindaj, ankaŭ oni povas diri ke ili ne estas tiel estimindaj kiel oni volis.

La sociala evoluo tra la jarcentoj produktis ŝanĝojn en la socio kaj familio, la novaj teknikoj, naskitaj kaj impulsigitaj sendube pro la pliiĝo de la homloĝantaro kaj disvolvigitaj profitante precize la laboron de ĉi tiu eksceso da homoj oni industriigis tiujn produktojn, kiujn ekde antaŭ malmulta tempo la virino produktis hejme por la konsumado de la familio, kaj ofte por vendi en la merkato aŭ foiro.

Ŝi pasis de produktado je familia nivelo al loka kaj al universala produktado, faciligita de la eksterordinaraj rimedoj de komunikigado, kaj ĉi tiu r: liskutebla transformado ne povis ne influi definitive en la familio.

Se ni, dum momento, pensus malvarme pri la profunda ŝanĝo spertita en la familio, kaŭze de la industriigo kaj disvendo de la konsumproduktoj, ni ne uzus nian tempon en dabatoj por decidi ĉu la virino devas, aŭ ne, labori ekster la hejmo, do logike estas ke ŝi laboru, precipe kiam la taskoj kiuj ŝi realigis antaŭe, estas nun absorbitaj de la socio.




Kiam ili ne plu estis utilaj je familia nivelo, tiuj funkcioj, karakterizitaj ne pro produktado de riĉaĵoj, sed pro familia ŝparado, estis malmulte estimitaj socie, kaj por ili estis humilige, konsekvence ĝi alportis al ŝi la ruinon de si cerbo.

Hispanio ne povas resti marĝene de la leĝara monda movado, kiu pri familia rajto oni ellaboras jam de longe, kaj kvankam malfrue, komenciĝas la irado per parta reformo de ŝia malnova leĝaro, kaj ni devas konsideri ĝin, malgraŭ la mallongeco, vere transcendan.

Antonio Linares
(Sabadell)

REKOMENDINDAS




LA CIUTAT CREMADA (LA BRULIGITA URBO) (1976) Direktoro Antoni Ribas. Diskutinda filmo laŭ propra opinio, precipe estas mallonga sed grava parto de la Kataluna historio. Ni opinias ke ĝi estas vidinda ĉar samtempe montras diversajn sociajn problemojn kiuj ne nur estas el Katalunujo, ĉar en tiu epoko -de la kolonista milito en Kubo ĝis Annual en Afriko- kelkaj sociaj aspektoj ne estas malsamaj en la tuta Eŭropo, ekzemple laborista movado, kaj kune kun ĝi, inter la laboristoj naskiĝas forta intereso por Esperanto, "stranga" lingvo aperinta en la fino de la antaŭa jarcento, kiun ni povas aŭdi dum preskaŭ dek minutoj en la filmo.

Ni devas esti sufiĉe sinceraj por rekomendi tiun filmon sen fari troan propragandon, sen diri ke ĝi estas la plej bona aŭ la plej mirinda, sed tamen ni devas diri ke ĝi estas tre interesa filmo, nur ĉar ĝi estas fariĝinta de niaj kinistoj, kaj se iu komencas fari seriozan kinon, tiam jam estas sufiĉe por ke ni atentigu ilin.

TEJO-RAPORTOJ. Certe, la laboro plej interesa kaj fruktodona farita de KER (Komisiono por Eksteraj Rilatoj) de TEJO estas la okazigo de seminarioj pri la rolo de la lingvo en la socio. En tiuj seminarioj partoprenas, krom esperantistoj, neesperantistaj fakuloj pri la traktata temo. Poste la partoprenantoj skribas raporton per la paroladoj kaj la konkludoj. Ĉar ili estas la plej seriozaj internaciaj studoj pri la tikkla temo de la rilatoj inter lingvo kaj ceteraj sociaj fenomenoj, ni ne nur rekomendas la atentan legadon kaj studadon de tiuj raportoj, sed eĉ avertas vin, ke por scii la veran situacion de la lingva problemo en nia nuna mondo, estas tute necesa la legadon de la raportoj de TEJO.

Vi povas mendi ilin rekte al KER al la jena adreso: Riouwstraat 172, Den Haag 2011, Nederlando.



LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVO-PLANADO Redaktoro: Prof. D-ro Richard E. Wood. Sub la aŭspicio de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo), tiu revuo pritraktas la rilatojn de la lingvo rilate al la sociaj, lingvistikaj, politikaj, juraj, psikologiaj kaj ekonomiaj fenomenoj. En ĝia redaktado kunlaboras diversajn neesperantistajn fakulojn pri la supre cititaj temoj, kaj ili skribas sialingve, aperante ankaŭ mallongan esperantlingvan resumon.

La samaj rekomendoj kiujn ni donis por la TEJO-raportoj, validas ankaŭ por tiu prestiĝa revuo, kaj en unu aspekto almenaŭ ĝi superas la alian, ĉar ĝi estas redaktata en pluraj naciaj lingvoj, ĝia disvastigo en la neesperantistaj medioj estas plej granda.